

Geografia nomenklature, 5-a parto
La landnoma demando laŭ Gaston Waringhien, 3-a parto
Claude Gacond, 286-a radioprelego, 1969.04.02 & 05

Parolas Claude Gacond.

Ni vin atentigis pri la graveco de la debato malfermita de Tibor Sekelj per la eldono de *Mondmapo* kaj de propono de geografia fundamenta nomenklature.

Ĉerpante el la verko *Lingvo kaj Vivo* de Gaston Waringhien ni provis poste raporti pri la naskiĝo de la landnoma sufikso **io**. Ni vidis, ke la landnoma demando estas afero tipe esperanta. En la dudek unuaj jaroj de la esperanto-movado nek Zamenhof, nek la esperantistoj atentis pri la problemoj de la landnomoj, tiom la formado de tiuj nomoj estas ĥaosa en la naciaj lingvoj.

Ni daŭre ĉerpas el Gaston Waringhien legante kaj resumante el ĉapitro titolita *La landnoma demando*.

Unue Zamenhof kaj la esperantistoj kontentiĝis por la formado de la landnomoj per la rudimenta solvo aldoni la sufikson **uj** al ĉia nomo de lando. Oni tiel trovas en la zamenhofaj verkoj antaŭaj al 1907 formojn kiel **Bolivujo**, **Brazilujo**, **Holandujo**, **Irlandujo**, **Palestinujo**, kaj ceteraj. Estas pruvo, ke tiam la sufikso **ujo** ne sinonimis al **skatolo**. Ĝi ludis la rolon por indiki, ke la antaŭa radiko estas geografia nomo, kiu signas landon. Kelkaj SAT-anoj fakte heredis tiun supersimplan sistemon. Ili alkroĉas sisteme sian sufikson **io** al ĉia landnomo kaj skribas **Koreio**, **Urugvio**, **Kanadio** kaj cetera.

Kiam la cirkonstancoj kaj la kritikoj invitis al pli funda esploro, tiam oni baldaŭ malkovris, ke, sub ekstera ĥaoso, distingiĝas kelkaj reguloj. Boirac estas la unua, kiu havis la honoron difini ilin. En julio 1909 li finis la antaŭparolon de sia *Plena Vortaro Esperanto-Esperanta* per jena paragrafo :

« Ni starigis kiel principon, ke la ĉefa kaj plej ĝenerala maniero estas nomi primitive la landon kaj devenigi la nomon de ĝiaj loĝantoj per la sufikso **ano**, kiel ekzemple **Eŭropo**, **Eŭropano** ; **Irlando**, **Irlandano** ; **Parizo**, **Parizano**, kaj tiel plu, kaj ke la alia maniero, tio estas nomante primitive la genton aŭ nacion kaj devenigante la nomon de la lando per la sufikso **ujo**, kiel ekzemple **Franco**, **Francujo** ; **Germano**, **Germanujo**, estas dua, akcesora, sekve en okazo de dubo neniam preferinda. Nur kiam ekzistas efektive gentoj, nacioj, havantaj propran historion, daŭrigas Boirac, nur tiam oni povas diri, ke la popolo nomas sian landon, kaj uzi la duan procedon ; sed en ĉiuj ceteraj okazoj estas pli ĝuste diri, ke la terloko nomas siajn loĝantojn ; kaj pro tio ŝajnas al ni, ke ekster Eŭropo kaj kelkaj partoj de Azio kaj Afriko, ĉie aliloke, nome en Ameriko, oni devas formi la nomojn per la unua procedo. **Brazilo**, **Ĉilo** kaj tiel plu ne estas, laŭ nia opinio, loĝantoj de **Brazilujo**, **Ĉilujo** kaj tiel plu, sed kontraŭe landoj, kies loĝantoj estas **Brazilanoj**, **Ĉilanoj** kaj tiel plu. Ni do tre deziras, konkludas Boirac, ke ĉiuj esperantistoj konsentu pri tiu ĉi regulo. En okazo de dubo, oni ĉiam preferu la sufikson **-an** al la sufikso **-uj** por formi la nomojn de popoloj kaj de landoj. »

En marto 1911 Zamenhof reuzis la argumentojn de Boirac. En sia *Lingva Respondo* li tamen antaŭvidas la eventualan sufikson **io** por landoj, kie vivas pli ol unu gento ; **Aŭstrio**, **Belgio**, **Svisio**. Zamenhof ne povis koncepti, ke la volo vivi kune povas esti tiel forta politika ligilo, kiel la rasa aŭ religia aparteneco.

Li provis tiri el la nacilingva uzado sistemon, kiun li poste pene aplikis en siaj postaj verkoj. Kaj ĝuste li ne kapablis sin komplete submeti al la teorie antaŭe decidita sistemo. La internaciaj realaĵoj estis pli fortaj, ol la teoriaj simpligoj de Zamenhof, Boirac kaj ceteraj esperantistoj.

Geografia nomenklature, 5-a parto
La landnoma demando laŭ Gaston Waringhien, 3-a parto
Claude Gacond, 286-a radioprelego, 1969.04.02 & 05

En sia tradicio de la *Malnova Testamento* Zamenhof ne povis klasi la landnomojn laŭ du kategorioj **ano** kaj **ujo**. Tria kategorio trudiĝis. En la zamenhofa traduko de la *Malnova Testamento* landnomoj finiĝas per **ujo** : **Egiptujo, Hindujo, Lubujo, Medujo, Persujo**. La gentoj estas tiam **Egiptoj, Hindoj, Luboj, Medoj, Persoj**. Aliaj landnomoj finiĝas per **io** : **Asirio, Fenicio, Mezopotamio, Samario, Sirio**. La gentoj estas **Asirianoj, Fenicianoj, Mezopotamianoj, Samarianoj, Sirianoj**. Fine tria kategorio enhavas landnomojn, kiuj ne havas apartan finaĵon : **Babel, Gilead, Kaftor, Izrael, Kanaan, Ŝinar**. La gentoj estas **Babelanoj, Gileadanoj, Kaftoranoj, Izraelanoj, Kanaananoj, Ŝinaranoj**.

Zamenhof rezignis pri tiu sistemo. Ĉe la modernaj regnoj de la malnova mondo la landnomoj uzitaj de Zamenhof formas almenaŭ 5 kategoriojn.

En la unua kategorio troviĝas nomoj finiĝantaj per **ujo**: Anglujo, Francujo. La ŝtatanoj tiam estas: Angloj, Francoj.

En la dua kategorio troviĝas nomoj finiĝantaj per lando : Belgolando, Finnlando kun du literoj **n**, Grekolando, Norveglando, Pruslando, Saksolando, Skotlando, Svislando. La ŝtatanoj estas tiam Belgoj, Finnoj, Grekoj, Norvegoj, Prusoj, Saksoj, Skotoj, Svisoj.

En la tria kategorio ankaŭ troviĝas nomoj finiĝantaj per lando : Finnlando kun unu litero **n**, Holando, Islando, Jutlando, Laplando, Zelando. La ŝtatanoj tiam estas: Finlandanoj, Holandanoj, Irlandanoj, Islandanoj, Jutlandanoj, Laplandanoj, Zelandanoj.

En la kvara kategorio troviĝas nomoj finiĝantaj per **io** : Alĝerio, Andaluzio, Kastilio, Pomerio, Siberio, Tunisio. La ŝtatanoj tiam estas Alĝerianoj, Andaluzianoj, Aragonianoj, Kastilianoj, Pomerianoj, Siberianoj, Tunisianoj.

En la kvina kaj lasta kategorio troviĝas nomoj sen aparta finaĵo : Gvineo, Hanovero, Maklenburgo, Palestino, Taŭrido, Tonkino. La ŝtatanoj tiam estas Gvineanoj, Hanoveranoj, Maklenburganoj, Palestinanoj, Taŭridanoj, Tonkinanoj.

Se oni komparas tiun zamenhofan liston kun la nuna uzo, oni konstatas, ke la solaj aldonoj, faritaj pro historiaj kaŭzoj, trovis lokon nur en la tri lastaj kategorioj. Oni senkonscie obeis la regulon de Boirac : Nederlando, Nederlandano ; Etiopio, Etiopiano, Cejlono : Cejlonano.

Tiu lasta kategorio ne ĉesas ampleksiĝi. Gaston Waringhien konkludas, ke estas la pruvo, ke fakte ne ekzistas regulo por la formado de la landnomoj, kaj ke la sufikso **ujo** estis artefaritaĵo.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-